



**47.^a HISPANA KONGRESO
DE ESPERANTO**

**1987
JUBILEA JARO**


16.^a-20.^a DE APRILO

MADRIDO

KONGRESO

47a HISPANA

ESPERANTO



MADRIDO 1987
16-20a aprilo

Prof. L. M. ... DIRECTOR DE LA REA HISPANA AKADEMIO
 Amador ... RECTOR DE LA MADRIDA UNIVERSITATO "COMPLUTENSE"
 ... OFER ...

Honora Komitato de la 47-a Hispana Kongreso de Esperanto

Honora Patrono: L.M. Juan Carlos de Borbón, Reĝo de Hispanio

Membroj:

Felipe González Márquez: PREZIDANTO DE LA HISPANA REGISTRARO
Félix Pons Irazazabal. PREZIDANTO DE LA PARLAMENTO
Carlos Solchaga Catalán: MINISTRO PRI EKONOMIO KAJ FINANCOJ
Javier Solana Madariaga: MINISTRO PRI KULTURO
Joaquín Leguina: PREZIDANTO DE LA AUTONOMA MADRIDA KOMUNUMO
Juan Barranco Gallardo: URBESTRO DE MADRIDO
Manuel Fraga Iribarne: EKSPREZIDANTO DE "ALIANCA POPULAR"
Amador Schüller. REKTORO DE LA MADRIDA UNIVERSITATO "COMPLUTENSE"
Cayetano López Martínez: REKTORO DE LA AUTONOMA UNIVERSITATO DE MADRIDO
Enrique Moral Saldoval: KABINET-DIREKTORO DE LA MINISTERIO DE LA RILATOJ KUN LA PARLAMENTO
Manuel Ortuño: SKABENO PRI INSTITUCIAJ RILATOJ DE LA URBO MADRIDO
Francisco Michavila Pitarch: DIREKTORO DE LA SUPERA TEKNIKA LERNEJO DE MINEJ-INGENIEROJ
José María de Tomás Puch: DIREKTORO DE LA OFICIALA LINGVOLERNEJO DE MADRIDO

Rafael Alberti: Verkisto

Camilo José Cela: Lingva akademiano kaj verkisto

Nuria Espert: Aktorino

Antonio Fraguas: Grafik-desegnisto

Angel Nieto Rolán: Monda ĉampiono pri motor-ciklismo

Hispanaj membroj de la Internacia Patrona Komitato

L.M. Juan Carlos de Borbón, reĝo de Hispanio

Marcelino Oreja Aguirre: ĜENERALA SEKRETARIO DE LA EŬROPA KONSILANTARO

Enrique de la Mata Gorostizaga: PREZIDANTO DE LA INTERNACIA RUĜA KRUCO

Pedro Laín Entralgo: DIREKTORO DE LA REĜA HISPANA AKADEMIO

Amador Schüller: REKTORO DE LA MADRIDA UNIVERSITATO "COMPLUTENSE"

Montserrat Caballe: OPER-KANTISTINO

Juan Antonio Giménez
Pl. Pintor Segrelles, 1-B-19.ª
46007 VALENCIA



Juan Antonio Giménez
1987.

loka kongresa komitato

Augusto Casquero de la Cruz: PREZIDANTO/KASISTO
Gian Carlo Figliera: VIC-PREZIDANTO
Guadalupe Sanz Bueno: SEKRETARIO
Juan Carlos Ruiz Sierra: LOĜADO
Miguel Fernández Martín: ARTAJ PROGRAMOJ
Ana Montesinos de Gomis: EKSKURSOJ
Perico Vilarroig Aroca: KONGRESEJO
Carmen Suárez Fernández-Cid: KOMITATANINO

BONVENON EN LA KONGRESO DE LA JUBILEA JARO

En la tuta mondo la esperantistoj celebras ĉi-jare per dignaj ceremonioj kaj solenaj feroj la Centjaran Jubileon de la naskiĝo de Esperanto, la internacia lingvo, kiu proponas sin kiel solvon de la monda lingva problemo.

La celebroy en Hispanio atingos sian apogeon en la 47-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiun patronas la plej altaj instancoj de la lando, sub la honora prezidanteco de la Reĝo.

Kiam la Madridaj esperantistoj akceptis la taskon organizi la kongreson en la Jubilea Jaro, ili konsciis pri sia respondeco. Dum du jaroj ili entuziasme laboris en la kadro de LKK por kunmeti interesan, kulturalan, laboran kaj distran programon. En tiu periodo LKK ĉiam konsciis pri la malfacilaĵoj de ĝi alfrontataj, kiuj ligiĝas al la limigitaj disponeblaj fortoj kaj al la problemoj renkonteblaj en granda metropolo.

Tamen, super-rekompencis nian laboron la konfido kaj subteno donita al LKK de la hispana esperantistaro: ĉi-lasta aparte multnombre aliĝis al la 47-a Kongreso kaj tio donas al ni senliman ĝojon.

Mi petas indulgon pro la eblaj organizaj eraroj de ni faritaj kaj deziras al ĉiuj partoprenantoj en tiu ĉi Kongreso feliĉan restadon en Madrido kaj fruktodonan laboron.

Augusto Casquero
prezidanto de LKK



Ayuntamiento de Madrid

Esperanto estas ne nur helpa lingvo; ĝi estas idealo, espero kaj movado por unueco kaj kompreno inter homoj pere de komuna lingvo.

Se lingvoj aŭ idiomoj estis iel diferenca kaj disiga faktoro inter kulturoj kaj landoj, kaj ne malofte kontribuis al naciismoj kaj diskriminacioj, Esperanto, anstataŭ disrompi kaj dividi, unuigas kaj, anstataŭ ĉirkaŭmuri kaj izoli kulturojn, disvastigas kaj proksimigas ilin.

Esperanto ne povas elveki kontraŭstaron. Ĝi ne peras submetiĝon profite al ajna ĉiopova disvastiĝanta Kulturo. Simple ĝi estas nova universala lingvo naskiĝinta el universala kulturo, kiu bezonas komunikadon kaj kompreniĝon inter malsamaj popoloj kaj nacioj.

Tio estas Esperanto, komuna kaj necesa ilo por reciprokaj proksimiĝo, fratiĝo kaj kompenso.

Madrido, universala kaj malferma, ĝojas esti la sidejo de ĉi tiu Jubilea Kongreso kaj deziras al vi agrablan kaj frukto-donan restadon inter ni.

JUAN BARRANCO,
Alcalde de Madrid

Madrido: la kongresurbo

LETERO AL LA GEKONGRESANOJ

Kiel la plejparto de la Madrida loĝantaro, mi naskiĝis en alia provinco de Hispanio. Tiel, la perspektivo de translokiĝo rezultis al mi kaj dolora kaj ĝena. Dolora, ĉar en la ŝanĝo mi perdis amikojn kaj pejzaĝojn. Ĝena, pro la nervoziga sento de la nekonata estonto.

Sed, post la eksento de tiu anim-stato, mi rapide adaptiĝis al la urbo, ĝia arkitekturo, ĝia etoso kaj ĝia spirito. Miaj kontaktoj kun eksterlandanoj kaj aliprovincanoj instigis min studi Madridon por respondi al iliaj demandoj.


Baldaŭ, mi interesiĝis pri la historio kaj personeco de la ĉefurbo, kies baza karakterizo estas servi kiel cemento de kulturoj kaj popoloj harmonie kunmiksataj. Iom post iom, mi ŝategis Madridon kaj mi enradikiĝis tie ĉi.

En la prahistorio, Madrido estis lulilo de primitivaj kulturoj, kiel evidentiĝas la arkeologiaj restaĵoj trovitaj en la tavoloj de la rivereto Manzanares. Sed, ne estis ĝis la jaro 852 p.K., kiam la urbo naskiĝis sub la formo de maŭra fortikaĵo por defendi la nordon de la rivero Tago kontraŭ la kristanaj atakoj. La vilaĝo, nomata "Magerito" (loko kun abunda akvo), estis rekonkerita de la Kastilia reĝo Alfonso la VI-a en 1083 kaj ekde tiam ĝi dependis de la reĝa Konsilantaro. En 1346 Alfonso la XI-a rajtigis Madridon havi propran demokratian urbo-statuson.

Meze de la deksepa jarcento, la imperiestro Karlo la I-a rekonstruis la araban fortikaĵon kaj en 1561 lia filo Filipo la II-a translokiĝis la kortegon el Toledo al Madrido. Tiu decido aspektas stranga, ĉar Valladolido kaj Seviljo estis la plej grandaj urboj de la epoko, kaj eĉ Alcalá de Henares estis multe pli granda ol la tiama Madrido. (Seviljo havis la plej mult-nombran loĝantaron de Hispanio ĝis la fino de la deksepa jarcento). Ĉu la translokiĝo ŝuldiĝas al simpla kaprico de la alkimista imperiestro? Ĉu ĝi rilatas al la proksimeco de la urbo al la reĝaj rezidejoj de Aranjuez kaj El Escorial?

Madrido kaŝas ankaŭ aliajn enigmojn. Ekzemple, kial ĝia blazono kun urso kaj arbeto? Kial la sep steloj?

Madrido, sinsekvo de reĝaj dinastioj konstruantaj monumentojn bazitajn sur gloro kaj mizero. Madrido, magneto de artistoj kaj eminentuloj allogataj de la vivo-ŝancoj ofertitaj de la Kortego. Madrido, respegulo de la konstante ŝanĝiĝanta junularo, kiu postulis novan ordon por nuntempo vivinda. Madrido, grandanima urbego, kiu ankoraŭ ne perdis sian spontanecon kaj kiu invitas vin ĉiujn kunvivi kaj kunsenti dun la nuna Pasko.



estraro de H.E.F.

Carreras Candi 34-36. 08028 Barcelona



HONORAJ
PREZIDANTOJ

Rafael Herrero Arroyo
Miguel Sancho Izquierdo

PREZIDANTO
VICPREZIDANTO
SEKRETARIO
VIC-SEKRETARIO
KASISTO
ESTRARANOJ

Salvador Aragay i Galbany
Luis M^a Hernández Izal
Victor Ruiz Rodríguez
Josep Miranda Calvo
Joan Font Civit
R. Urueña Alvarez, V. Ortiz Gratal
F. Zaragoza Ruiz, A. González y
T. Caspe Cereijo



ELDONA FAKO
FINANCOJ
INFORMA FAKO
FERVOJISTA SEKCIO
JUNULARA SEKCIO

Inés Gastón Burillo
Agustín Foix
Enrique Piquero
Rafael Ruiz Criado
Alberto Franco




LIBRO-SERVO

L. Hernández García
Apdo 119. Valladolid

ĈEFDELEGITO DE UEA

J. Azcuénaga de Vierna
Gral. Dávila 127, portal 7, 2.º I
39007 Santander



OFICEJO

J. M^a. González Aboín
Rodríguez San Pedro, 13 - 3.º
28015 Madrid



bonvenigo

AL LA SAMIDEANARO

Antaŭ nia Jubilea Kongreso, denove mi saluts vin, la tutan esperantistaron, esperante renkonti ĉiun el vi en Madrido.

La ĉi-jara Hispana Kongreso havas tre rimarkindan signifon. Ne nur ĉar ĝi markas la komenciĝon de la Dua Jarcento de la antaŭeniĝo de la Movado en nia lando, sed, precipe, ĉar lastatempe ekstaris kaj firmiĝis pli kaj pli la federacia sento.

Se ni povas fieri pri io en nia asocia evoluo, estas ĉefe pri tio. Ni povas aserti, ke en Hispanio ĉiuj sentas kaj ŝatas federaciemon, sendistinge de autonoma komunumo, lingvo, religio kaj politika tendenco, ĉar ĉiuj esperantistoj akceptas la Federacion, sen ia ajn rezervo nek kondiĉo.

Pruvo pri tio estas la kreskanta florado de novaj oficialaj Esperanto-Asocioj aliĝintaj al la Federacio, nun jam 48, la plej alta cifero dum la ekzisto de nia Hispana Esperanto-Movado.

Tiel, do, kara kongresano, la 47-a Kongreso malfermas sian pordon atendante vian ĉeestadon. Ni certigas vin, ke vi gustumos la plej gravan kaj interesan ĉiĵaran eventon de la Esperanto-Movado en nia lando.

*En la nomo de HEF
La Prezidanto
Salvador Aragay i Galbany*



HEJS **hispana esperantista junulara societo**

Prezidanto: Alberto Franco Ramírez (Seviljo)

Vicprezidanto: Miguel A. Sancho (Madrid)

Unua Sekretario: Francisco A. Antúnez (Seviljo)

Dua Sekretario: Antonio Rodríguez Gasch (Seviljo)

Komitatano C: Pablo J. Romero (aplikado de Scienco en Esperanto). **Komitatanoj A:** Jesús Armengol Arbiol, José María Rodríguez, Jorge Camacho Cordón.

Komisiitoj: Alberto Franco (financoj), M.A. Sancho (eldonoj), Antonio Rodríguez (paĝo de HEJS en Boletín), Jorge Camacho (komitatano de HEJS en TEJO, kulturaj rilatoj kun KEJ, informoj al TEJO-Tutmonde).

“HEJS-Juneco”: Miguel A. Sancho.

Oficejoj:

— Centra: Sol, 75 - 41003 Sevilla. Tel. (954) 41 59 91

— Madrida: Atocha, 98 - 28012 Madrid. Tel. (91) 230 87 98

al la junularo

Kial ĉi-jare la 47a Hispana Kongreso montriĝos al ni, gejunuloj kaj similaj el preskaŭ tuta Hispanio, iel iom speciala? Ĉu pro Madrido? Ne! Ĉu pro la Centjara Jubileo? Ankaŭ ne! Kial do? Samtempe, samurbe, sameje kaj senkoste okazos nia 11-a HEJS-renkontiĝo, laŭaspekte pli magra kaj modesta ol la antaŭaj dek.

Jubileeco de 1987 ne garantias eksterordinaraĵojn. Tion ĉi certigas neniam datrevenoj, rondaj ciferoj aŭ magiaj nombroj, sed organizaj kapablo kaj sindediĉo de unuopuloj en serioza kunlaboro. Ni ne ridindigu nin. Al jubileaj simboloj, flagetoj, flagegoj, ĉefartikoloj kaj tielpluaĵoj ni apliku la zamenhofan diron: la nepoj nin benos, se ni pacience eltenos.

Gravaj demandoj prezentiĝos refoje antaŭ la membroj de HEJS dum tiu ĉi aranĝo, ĉefe pri la estonta rolo kaj precizigota formo de niaj renkontiĝoj, organoj, nacia kaj internacia agadoj, kulturaj aktivaĵoj kaj multaj pliaj eroj de la vivo de nia hispana junulara movadeto. Ĉar ni, kaj ne nur ni, malfortas, kvante kaj kvalite, kaj tion ni ne rajtas forgesi.

Mia invito al tiu ĉi kongreso implicas insistan instigon al la junularo partopreni ĉi-somere en la Krakova Internacia Junulara Kongreso. Ni vojaĝu tien, ĉien ajn, sed ni kuniĝu antaŭe en Madrido; en ĝi ni replenigos niajn rezervujojn kaj el ĝi ni daŭrigos nian veturon.


Georgo Kamaĉo

la esperanto-movado en madrido

La unua Madridano, kiu okupiĝas pri la noviniciatita internacia lingvo, estas Joaquín de Arce y Bodega, bibliotekisto de la Senato: en **1889** li akiris tri ekzemplerojn de la Esperanto-lernolibro eldonita de D-ro Zamenhof en 1887. Iom poste (**1898**) la eks-prezidanto de la Hispana Respubliko, Pi y Margall, publikigas artikolon en "El Nuevo Régimen", en kiu li laŭdas la internacian lingvon kaj deziras al ĝi brilan estonton: en **1900** li denove aperigas plurajn artikolojn en la Madrida semajna eldonaĵo "Alrededor del mundo".

La Madrida Ateneo organizas en **1899** la unuan kurson de Esperanto, kiun gvidas Ramón Andrén. Ĉi-lasta publikigas resumon de la Esperanta gramatiko en la "Revista de estenografía y fonética" kaj poste aperigas vortaron Hispana-Esperanto. Unu el la lernantoj de la dirita Atenea kurso estis la juna oficiro Vicente Inglada Ors, kiu publikigas Esperantan lernilon, sekvata multjare en Madrido kaj Barcelono.

En **1903** Andrén, kune kun la menciita Arce y Bodega, aliĝas al la "Internacia Esperanto-Movado", al kiu apartenas 13 Madridaj esperantistoj. La sekvantan jaron (**1904**) la Santanderano Andrés Bravo del Barrio fondas en Madrido la Madridan Esperantistan Sekcion de la Kultura Societo "Fomento de las Artes". Ekde tiu ĉi momento pliiĝas en Hispanio la kreiĝo de esperantistaj grupoj kaj asocioj, inter kiuj la "*Madrida Esperanta Grupo*" (**1907**), kies unua prezidanto estas la kapitano José Perogordo kaj kies sidejo troviĝas en la strato Bola 12, en Madrido. En **1910** la reĝo Alfonso la XIII-a akceptas la grup-prezidanton, kiu omaĝe transdonas al li la lukse binditan numeron de la belarta periodaĵo "La revuo" kaj dankas lin pro la ordeno de Isabel la Katolika, asignita al Zamenhof dum la Universala Kongreso en Barcelono en **1909**.



La 6-a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en Madrido en 1926. La kongresejo estis "Ateneo de Madrid". Sur la fotografiaĵo, publikigita en la revuo AHORA, aperas la organizantoj José Perogordo kaj Julio Mangada (centro) kaj aliaj eminentaj esperantistoj, inter ili, Carlos San Antonio, Mariano Mojado, Francisco Azorín, Luis Escartin, S-ro. Calahorra, Vicente Alonso kaj Vicente Inglada. (Fotografiaĵo de Lucrecia San Antonio).

La unua Madrida Esperanto-revuo naskiĝas en **1908** sub la titolo “*Hispana Revuo*”: ĝin redaktas José Menéndez kaj ĝia sidejo lokiĝas en la strato Echagaray 17.

Komence de **1909**, Luisa Ayza fondas en Madrido la unuan kaj tiutempe unikan specife virinan asocion “*Virina Esperanto-grupo*”, kies sidejo troviĝas en la strato de la Madera 5-7, kie en **1912** instaligiĝas la “*Sociedad Española para la propaganda del Esperanto*”, prezidata de Román Ayza Maquen.

La “*Gaceta de Madrid*” publikigas la 15-an de aŭgusto **1911** Ministerian Ordono, kiu rajtigas la instruadon de Esperanto en publikaj lernejoj kaj universitatoj en tuta Hispanio. La dirita faro estas rezulto de la penadoj de la Madridaj esperantistoj José Peregordo ka D-ro Rafael San Millán. Samjare L.M. la reĝo Alfonso la XIII-a denove akceptas Peregordo, kiu transdonas al li simblon donaceton por la Reĝino.

En **1915** la Madrida Esperanta Grupo presigas artikol-kolekton de elstaraj esperantistoj pri la vivo de la aŭtoro de Don Kifoto.

La grupoj “*Centra Madrida Grupo*” kaj “*Verda Stelo*”, ĉi-lastaj aganta en la kvartalo Prosperidad, organizas en **1916** plurajn kursojn de Esperanto, unu el kiuj en la Ateneo de Madrido. La Centra Madrida Grupo dissendas cirkuleron petante al la parlamentanoj, provincaj deputitoj, urbestroj kaj prezidantoj de entreprenoj, speciale komercaj, apogi la enkondukon de Esperanto kiel komerca lingvo. La sama Centro presigas “*Cartilla Esperantista*”, kiun ĝi senpage disdonas kaj utiligas en la kurso de la Komerca Lernejo.

La *Federacio Zamenhof* kaj la revuo “*Hispana Esperanto*” naskiĝas komence de **1917** en Madrido, dank’ al la iniciativo de Julio Mangada kaj de grupo de aktivuloj, post la malapero de la Hispana Societo.

Kiam en aprilo 1917 mortas en Varsovio D-ro Zamenhof, en Madrido okazas memor-celebro ĉe la asocio “*Amigos de la enseñanza*”: D-ro Rafael de San Millán eldiras apologion pri la idearo de Zamenhof kaj Juan Calahorre prelegas pri Esperanto.

La Kongreso de la Hispanaj Sindikatoj, okazinta en Madrido en **1919**, decidas divstigi Esperanton kiel eble plej multe.

La Madridano Carlos Mario Cortezo, prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro kaj de la Medicina Akademio, kaj lingva akademiano, esperantiĝas en **1925**.

D-ro C. San Antonio kune kun J. Mangada en **1928** fondas la grupon “*Antaŭen*”, kies samnoma ĥoro samjare plenumas turneon tra Hispanio.

En **1931** la sidejo de *Hispana Esperanto-Asocio* troviĝas en Madrido. Tiam pluraj parlamentanoj estas membroj de la Asocio (F. Azorin, N. de Pablo, R. Almada, C. Redondo). La ĵurnalo “*Estampa*” en Madrido dediĉas grandan artikolon al Esperanto en Cheste kaj la ĉefurbaj periodaĵoj ofte enŝovas en siajn paĝojn informojn pri la evoluo de la Madrida Movado.

Sub la aŭspicioj de HEA komenciĝas kurso en Radio España dufoje semajne, kaj diversaj kursoj en la Madrida Ateneo, Kuracista Asocio, lernejo Pablo Iglesias kaj Centro de Historiaj Studoj. La kurso, organizita de la Ateneo (Pedagogia Sekcio) en **1933** asignas subvencion de 400 pesetoj kaj senpagan aliĝon al la Kolonja Kongreso al la plej elstaraj lernantoj.

En **1951** rekomenciĝas la Esperanto-kursoj en Madrido, post 14-jara interrompo, kio signifas reviviĝon de la ĉefurba Esperanto-Movado post la intercivitana milito. En Radio SEU komenciĝas la programo “*Antena Esperantista*” (**1952**), kiu daŭros du jarojn. Samepoka estas la grupo *Diamanto*, kreita de A. Gansó, kiu kunigas junajn esperantistojn.

Hispana Esperanto-Federacio, prezidata de Angel Figuerola Auque, denove transiras al Madrido en **1970** kaj la movado de nevidantoj kreskas dank’ al agado de José Ezquerria de ONCE.

En Madrido fondiĝis pluraj asocioj: *Hispana Esperanto-Asocio* kaj *Hispana Esperanto-Instituto* (1926), *Madrida Esperanto-Grupo* (1950), *Hispana Esperanto Aŭroro* (por blinduloj) en 1951 kaj, fine, *Liceo Madrileño de Esperanto* (1962), kiel daŭrigo de *Madrida Esperanto-Klubo* (1953).

La *Klubo Esperantista de Madrido* kreiĝas en 1953: ĝia unua prezidanto estas Lopez Herrero. En 1954 ĝi transiras al la Centro Riojano, en la strato Pizarro 19; en 1956 prezidas ĝin Martín Gomez, kiun sekvos, en 1960, Angel Figuerola, Sanos Perez Arranz en 1963, Tomás Ortiz en 1965, kaj Miguel Diez y Diez en 1966. En tiuj jaroj, inter 1960 kaj 1964, la sidejo kelkfoje elmigras: unue al la strato Espozimina 1, poste al Artistas 1, al Alberto Aguilera 32, al Princesa 78, al Albuquerque 14 kaj al Hortaleza 84. La nuna sidejo, en strato Atocha 98, estas inaŭgurita en 1978.

Necesas memori, ke fine de 1977 Augusto Casquero transprenas la prezidentecon de MEL. Lin sekvas, de 1984 ĝis nun, Guadalupe Sanz. Samjare Angel Gansó kreas grupon de esperantistaj emerituloj en Emeritula Hejmo ĉe la Toleda Ponto, en Madrido.

La statutoj de la *Liceo Madrileño de Esperanto* kaj la anstataŭigo de la vorto "klubo" per "liceo", konsiderata pli taŭga por tia organizaĵo, aprobiĝas en 1962, sed en 1977 por aperi en la telefonlibro sub la nomo Esperanto, la statutoj denove ŝanĝiĝas kaj la titolo fariĝas *Esperanto-Liceo de Madrido*; tiu ĉi lasta titolo konserviĝis ĝis nun, kvankam la populara formo estas Liceo Madrileño de Esperanto (MEL). Dek jarojn pli frue, en 1968, okazas en Madrido la 53-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenas 1769 kongresanoj el la tuta mondo.

En 1979 Hispana Esperanta Junulara Sekcio (nun *Hispana Esperantista Junulara Societo*) translokiĝas al la sidejo de MEL.

En 1979 instaliĝas en Madrido la internacia revuo "*Heroldo de Esperanto*", kiu kelkajn jarojn poste eldonos la lernolibron "*Nuevo método de Esperanto*" de Fernando de Diego.

Madrida Esperanto-I liceo plenumas tre intensan pedagogian agadon, kiu atingis sian supron en 1980, kiam preskaŭ 800 lernantoj vizitas ĝiajn kursojn. En 1979, 1980, 1981 kaj 1985 ĝi lanĉas traduk-konkursojn, kiuj renkontas vastan eĥon eksterlande.

La turismaj kaj literaturaj verkoj iniciatitaj de MEL plimultiĝas en la pasintaj jaroj: "*Parolu Esperanton*", "*Madrido kaj ĉirkaŭaĵoj*", "*Sentempa simfonio*", "*Sanga nupto*", "*La domo de Bernarda Alba*", "*Datos acerca del movimiento esperantista*" kaj pluraj informiloj.

En 1985 la Liceo donacas al la Museo del Quijote de El Toboso (Toledo) ekzempleron de la Esperanta traduko de la senmorta ĉefverko.

La Biblioteko de MEL (700 titoloj) kreiĝas en 1966 kaj ĝi daŭre kreskas ĝis atingi konsiderindan bibliografian valoron: ĝiaj verkoj estas ekspoziciataj en 1980 en la Nacia Biblioteko, en 1987 en la Madrida Ŝparkaso kaj en la Nacia Hemeroteko.

La informada laboro por la disvastigo de la internacia lingvo esprimiĝas per la partopreno de la plej aktivaj Liceanoj en radio kaj televid-programoj, same kiel en gazet-intervjuoj. Propagandcele estas preparitaj ankaŭ insinjoj, ĉemizetoj, ŝlosilringoj, kalendaroj, alumet-skatoloj kaj afiŝoj ĉiujare algluataj surstrate.

La ĥoro de MEL "*Verda Stelo*" kreiĝas en 1984: ĝin iniciatas kaj gvidas Perico Vilaroig, aŭtoro de la muziko de la Licea himno, kies vortojn verkis Juan Carlos Ruiz.

Ĉiuj sociaj, kulturaj kaj propagandaj aktivaĵoj de MEL aperas en la monata bul-teno "*Nia Voĉo*", kiu startas en 1966 kaj nun redaktas Gian Carlo Fighiera. La alveno de ĉi-lastaj kaj de lia edzino Ada Sikorska al MEL kontribuas levi la lingvan nivelon de la Liceanoj. Preterpase ni menciuj, ke dekoj da eksterlandaj esperantistoj,

inter kiuj gravaj eminentuloj movadaj, vizitis la Liceon.

En **1982** inaŭguriĝas en la Madrida kvartalo San Blas la strato "Idioma Esperanto" kaj samjare, en la kadro de la Tutmondaj Futbalaj Ĉampionludoj, MEL organizas Sportan Seminarion, en kiu partoprenas raportantoj el diversaj landoj.

La nova Licea flago estis preparita en **1983** de Alicia Ballester kaj konsistas el la Esperanta flago, en kies centro situigas la urba blazono, ĉirkaŭita de la nomo de MEL.

En **1984** kaj **1985** du membroj de MEL, José F. Arroyo kaj F.J. Monleón, atingis gravajn premiojn en internaciaj literaturaj konkursoj.

En **1985** kaj **1986** profesoroj de MEL organizis kursojn de Esperanto ĉe la Universitato.

Kelkfoje la Madrida Esperanto-movado atingis subvenciojn de diversaj instancoj por esperantaj aktivaĵoj, nome la Ministerioj de Kulturo kaj Turismo, Madrida Urbodomo, Madrida Komunumo, Hispana Komisiono de Unesko, Ŝparkaso de Madrido, kt.p. Dank' al la demarŝoj de MEL (**1986**), unuafoje en la historio de la hispana Esperanto-movado, la Kultura-Ministerio subvenciis Esperanto-tradukon, rigardante Esperanton egalrajta kiel la naciaj lingvoj.


Madrido gastigas la naciajn Esperanto-kongresojn en **1926, 1932, 1957, 1973, 1980**. La lastan kongreson honor-prezidis Ŝ.M. la Reĝino, la honora prezidanto de la nuna kongreso estas L.M. la Reĝo.

Nuntempe la sola laŭleĝe registrita soci-kultura Esperanto-grupo estas Madrida Esperanto-Liceo, al kiu aliĝas centoj da esperantistoj. Tamen, la Esperanto-movadon de la ĉefurbo ankaŭ formas aliaj malgrandaj societoj, funkciantaj en diversaj kvartaloj (Salamanca, Alcorcón, Moratalaz, Fuencarral, Chamberí ktp.): per laboro de kelkaj Esperanto-instruistoj, la lingvo kreita antaŭ cent jaroj de L.L. Zamenhof pli kaj pli disvastiĝas en Madrido.

Redaktita de Lupe Sanz Bueno, prezidantino de MEL (laŭ historia eseo de A. Marco, notoj de Augusto Casquero, diversaj hispanaj revuoj kaj "Nia Voĉo").

Madrid, Jubilea Jaro, 1987

KONGRESA PROGRAMO(*)



(*) La neutralaj, gravaj kaj publikaj oficialaj programeroj de HEF kaj LKK

ĴAŬDON, 16 aprilo 1987

- 10,00 - 14,00 — Disdonado de la dokumentoj al la kongresanoj (bonvolu kontroli, ke vi ricevis la kuponojn korespondantajn al kaj viaj antaŭpagitaj mendoj).
15,00 - 19,00 — Lunĉo (eblas en la Kongresejo).
14,00 — **Renkontiĝo inter la prezidanto de UEA kaj la individuaj membroj kaj delegitoj de UEA.**
15,00 — **Renkontiĝo inter la prezidanto de UEA kaj la individuaj membroj kaj delegitoj de UEA.**
17,00 — Gvidata promenad-vizito tra malnova parto de Madrido (Komuna foriro el la kongresejo).
19,00 — **Hispana Esperanto-Junulara Societo (HEJS) sin prezentas** (Publika kunveno, ne nur por gejunuloj).
20,00 — **Interkona vespero** (senpaga sangrio).
22,00 — Junulara festo.

VENDREDON, 17 aprilo 1987

- 10,00 — **Oficiala Malfermo de la Kongreso.**
(Auditorio de la Kongresejo).
Fest-prelegos D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA.
Muzika paŭzo fare de Laura Carballo.
- 12,00 - 13,30 — Disdonado de la dokumentoj.
12,00 — **Gazetara Konferenco** por la gazetaro, radio kaj televido (nur por invititoj).
12,00 — Unua intensiva, 6-hora kurseto. Temo ĉi-jara: "La esperanta konjugacio". Gvidos Antonio Alonso Núñez, kiu malvolvos la unuan lecionon pri la pliriĉigaj tendencoj en la Esperanto-konjugacio: tempoj, aspektoj, gradoj, statoj. Por la ceteraj lecionoj la interesiĝantoj elektos mem la konvenan tempon.
- 13,30 — Oficiala foto.
14,00 — Lunĉo (eblas en la Kongresejo).
15,00 — **Artaj kaj sciencaj horoj:**
"Laseroj en la moderna vivo" de Hugh P. Reid (Skotlando).
"Esperanta poezio" Poem-legado kaj komentoj de Julio J. Juanes.
- 16,00 — **Oficialaj ekzamenoj de HEF kaj la hispana sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj:** lingvo-kono kaj rajtigo al Esperanto-instruado.
16,00 — **Kunveno de la estraro de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kun la delegitoj de la lokaj Esperanto-societoj.**
16,00 — Akompanata vizito al la Madrida Planetario (komuna foriro el la kongresejo).
17,00 — **Ĝenerala kunveno de HEJS** (nur por gejunuloj).
20,00 — **Teatra Vespero** (en la "Centro Cultural Buena Vista", Avenida de los Toreros, 5. Metroo: Diego de León).
"La gruto de Salamanca" de Miguel de Cervantes.
"Pikniko sur la bataalkampo", unuakta teatraĵo de Fernando Arrabal.
Ludas la Bulgara Esperanto-Teatro.
(Komuna foriro el la kongresejo je la 19,15). Nur por kongresanoj inter n-roj 1-150.

SABATON, 18 aprilo 1987

- 10,00 — **Artaj kaj sciencaj horoj:**
“Tradukita internacia proverbaro” de Xaime Canoa González.
“Kanta kaj muzika prezentado” de la familio López-Hernández.
- 11,30 — Prezentado pri Andaluzio, sekvata de
Prezentado pri Valencio, urbo de la 48-a Hispana Kongreso de Esperanto.
- 13,00 — Kunveno de la estraro de HEJS kun ĉi ties komisionoj.
- 13,00 — “Madrido tra la jarcentoj”: aŭdvida prezentado de Juan Carlos Ruiz.
- 14,00 — Lunĉo (eblas en la Kongresejo).
- 16,00 — **Generala Kunveno de la membraro de HEF.**
- 18,00 — Samtempaj fakaj kunvenoj:
* IFEF (fervojistoj)
* ILEI (instruistoj)
* BAHAA-anoj
* aliaj fakkunvenoj.
- 20,00 — **Teatra Vespere** (por la kongresanoj de n-roj 151 ĝis fino). (En la “Centro cultural Buena Vista. Avenida de los Toreros 5. Metroo: Diego de León).
“La gruto de Salamanca” de Miguel de Cervantes.
“Pikniko sur la batalo” unuakta teatraĵo de Fernando Arrabal.
Ludas la Bulgara Esperanto-Teatro.
(Komuna foriro el la kongresejo je la 19,15).

DIMANĈON, 19 aprilo 1987

- 10,00 — Katolika Meso (Kongreseja kapelo. Celebros Pastro Musazzi).
- 11,30 — Projekcio de filmo en Esperanto pri la Eŭropa Ekonomia Komunumo.
- 12,30 — **Artaj kaj sciencaj horoj:**
“La lingvoj de la Iberia duon-insulo”. Debato kun po unu denaska parolanto de tiuj lingvoj, sub prezido de William Auld (Skotlando).
- 15,00 — Elementa kurso.
- 16,00 — Prezentado de la novaj Esperanto-verkoj.
- 18,00 — **Oficiala Fermo de la Kongreso:**
* Omaĝo al la fratinoj Gastón.
* Disdono de diplomoj.
* Anonco de la Premio “Clara Silbernik”
* Gast-parolado de William Auld (Skotlando) pri: “Cent jaroj de vivo kaj espero”.
(en la Auditorio de la Kongresejo).
- 19,30 — Libera distra programo: la scenejo estas je dispono de la kongresanoj.
(Auditorio de la Kongresejo)
- 20,30 — Adiaŭa Bankedo (Restoracio Murillo, Bravo Murillo, 120; Metroo: Alvarado).

LONDON, 20 aprilo 1987

- 9,00 — Postkongresa ekskurso al Toledo kaj Chinchon.
(Foriro de la aŭtobusoj el la Kongresejo).
- 9,30 — Senpaga aŭtobusa vizito tra Madrido.
(Foriro de la aŭtobuso el la Kongresejo).
- 19,00 — **Oficiala akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro de Madrido.**



SALAMANCA

**CENTRO CULTURAL
"BUENAVISTA"**

**Avenida de los Toreros, 5.
T. 245 50 27**

"Cent jaroj de Esperanta literaturo"

Inter la 14-a kaj la 26-a de aprilo 1987, oni povas viziti la Ekspozicion de Esperantaj libroj, organizitan de LKK en la ejoj de la Caja Madrid, Eloy Gonzalo, 10. Vizit-horoj: 11-13 h.; 18-21 h. (Fermita dum Pasko).

hispanaj esperantaj grupoj

Sur la sekvantaj paĝoj aperas listo de la hispanaj esperantaj grupoj kaj de la kongresanoj.

1. Rafael Blanco Arlé. Plaza Zaldiaran, 1 - 6°. 01008 Vitoria (Alava)
2. Grupo de Esperanto. San Fernando, 39. 03001 Alicante.
3. Sro. Antulio Asensi. Joaquín Sorolla, 6 - 10°. 03800 Alcoy (Alicante).
4. Sro. Angel Miralles. Avda. Madrid, 41. 03680 Aspe (Alicante).
5. Grupo de Esperanto. Queipo de Llano, 18. 03360 Callosa de Segura (Alicante).
6. Grupo de Esperanto. José Santos Orts, 5. 03204 Elche (Alicante).
7. Grupo Idioma Esperanto. Goya, 58 - 3° C. 03660 Novelda (Alicante).
8. Grupo Idioma Esperanto. S. Gregorio, 25 - 1°. 03300 Orihuela (Alicante).
9. Astura Esperanto-Asocio. Enrique Cangas, 25. 33206 Gijón (Asturias).
10. Barcelona Esperanto-Centro. José Carreras Candí, 34/36. 08028 Barcelona.
11. Centre Comarcal Lleideta (Esperanto). Gran Via, 592 - 1 - 2°. 08007 Barcelona.
12. Hispana Esperanta Fervojista Asocio. Ronda San Antonio 46-50-2. 08001 Barcelona.
13. Kataluna Esperanto Asocio. Apdo. 32318. Barcelona.
14. Grupo de Esperanto "Aŭroro". Mallorca, 580. 08025 Barcelona.
15. Hispana Esperanto Instituto. Plaza de España, 1 - 4°. 08004 Barcelona.
16. Amics UNESCO Esperanto. Mallorca, 207. 08036 Barcelona.
17. Esperanto-Grupo. A. Einstein, 1 - 1° 3ª B. 08860 Castelldefels (Barcelona).
18. Esperanto-Fako - Geava Domo. Circumvalació, 60. 08240 Manresa (Barcelona).
19. Lingua Club. Sant Joan Bautista la Salle, 2. 08003 Manresa (Barcelona).
20. Grupo Esperanto. Forn, 99. 08180 Moiá (Barcelona).
21. Grupo de Esperanto. Ronda d'Orient, 8 - 4° 4ª. 08100 Mollet del Vallés (Barcelona).
22. Grupo Esperanto "Josefo Angles". Orient, 59 - 1° 3ª. 08190 S. Cugat del Vallés (Barcelona).
23. Hispana Esperanto Muzeo. Dr. Zamenhof, 12. 08739 Sant Pau D'Ordal (Barcelona).
24. Grupo de Esperanto. Carrer de Ponent, 16. 08739 San Pau d'Ordal (Barcelona).
25. Noia Esperanto Grupo. Forn, 19. 08770 S. Sadurní d'Anoia. (Barcelona).
26. Esperanto. Centre Excursionista. Sant Josep, 20. 08922 Santa Coloma de Gramanent (Barcelona).
27. Esperanto Grupo "Anton Bal.". Font Nova, 32. 08207 Sabadell (Barcelona).
28. Grupo de Esperanto. Avda. 11 Setembre, 59. 08208 Sabadell (Barcelona).
29. Centro de Esperanto. Apartado 407. 08080 Sabadell (Barcelona).
30. Associació Cultural Esperantis. C/ Montseny, 5, 1°. 08208 Sabadell (Barcelona).
31. Juventud Esperantista. San Mariano, 122. 08221 Terrassa (Barcelona).
32. Tutmonda Esperanto-Grupo. Apartado 313. 08280 Terrassa (Barcelona).
33. Secció Esperanto. Grup Filatelia. Rambla d'Egara, 340 - 2°. 08221 Terrassa. (Barcelona).

